3. Problemoj de iniciato kaj planado de organiza evoluo konsistigas iom apartan grupon. En la Esperanto-movado ekzistas abunda materialo pri tiu temo. Pluro de proponoj kiuj en sia ĉefa senco ofte estas nerealaj povas esti realigeblaj parte aŭ en alia sfero de la movada agado. Ni rememorigu al ni metodon de grupa solvado de problemoj konata sub la nomo »cerba sturmado« (brainstorming). Jen kunveninta aro de fakuloj »ĵetas« diversajn proponojn celante solvi starigitan problemon. Post kompilo kaj reciproka komparo de kolektitaj ideoj oni prilaboras finan solvon, konsiderante ankaŭ proponojn ŝajne absurdajn, ĉar post la transformiĝo ili povas esti utilaj. Same projektoj de pensemaj sammovadanoj ĉiuokaze meritas pridiskuton ĉar en ili ofte troviĝas valora semo.

### III. Eksteraj rilatoj de organizo

Ĉiu organizo agas en sia medio, konsistiĝanta el aro da sociaj, kulturaj, ekonomiaj, teknikaj kaj eĉ biologiaj kondiĉoj. Graveco de eksteraj rilatoj estas precipe konsiderinda por tiaspeca movado kiel esperantismo. Jen la plej urĝaj demandoj:

1. Kiaj sociaj kondiĉoj precipe favoras al disvolvo de la movado?
2. Kiuj direktoj de eksteraj rilatoj plej esperigas?
3. Kiuj remedoj plej efikas el vidpunkto de movadaj celoj kaj kiuj estas plej ekonomiaj?

Ŝajne plej efika paŝo en disvolvo de esperantismo estus anstataŭigo de privata UEA per organizo interŝtata. Jen stariĝas nova demando: kiom da ŝancoj havas la Esperanto-movado por atingi tion? Kiuj rimedoj de publikaj rilatoj plej efikas en ĝia diskonigo? Alivorte: kiel agi eksteren posedante difinitajn fortojn kaj situacion?

Fine ni kolektu ĉefajn ideojn de ĵusa prilaboraĵo:

1. La Esperanto-movado por plua disvolvo bezonas detalajn kaj firmajn informojn pri si mem atingeblajn pere de la scienca esplorado.
2. Por koordini fortojn agantajn tiudirekten estas bezonata ampleksa plano de esploroj.
3. Plej esperigan vojon por komencaj studoj la aŭtoro vidas en esplorado de movadaj institucioj kaj organizoj.



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 17, n-ro 3-4 (1966)

347.957 + 233

## PRI LA ESENCO DE LA REVANDIKACIO[1])

### (rilate al la bulgara civila juro)

(Lj. Mihajlov, Sofio, Bulgario)

La enradikiĝinta difino de la revandikacia postulo, ke ĝi estas postulo de la neposedanta proprietulo kontraŭ la posedanta neproprietulo ne nur neplene, sed ankaŭ neprecize respegulas la escencon de la postulo. La revandikacia postulo estas nek postulo de ĉiu neposedanta proprietulo, nek postulo kontraŭ ĉiu posedanta neproprietulo. La revandikacia postulo ankaŭ ne estas postulo nur de la proprietulo.

La revandikacia postulo prezentas defendon de tiuj realaj rajtoj[2]), kiuj inkluzivas en sia enhavo rajtpovon por posedi la materian ajon, kiu estas objekto de la rajto. La revandikacia postulo estas defendo de la rajtpovo por posedi. La defendo, kiun la revandikacia postulo donos al la rajtpovo por posedi, konsistas en la ebleco esti redonita la posedo al la titolulo de la reala rajto, t. e. esti restituita la posedo, ĉu senpera, ĉu pera, depende de tio, de kia posedo estas senigita la titolulo de la reala rajto. Estante postulo por defendi la rajtpovon por posedi, la revandikacia postulo defendas ne nur la realan rajton de proprieteco, sed ankaŭ la ceterajn realajn rajtojn, en la enhavo de kiuj estas inkluzivita la rajtpovo por posedi.

La revandikacia postulo estas rimedo por batalo kontraŭ la rompiĝoj de la reala rajtpovo por posedi, rimedo por forigo de tiaj

1) revindication (A) ,revendication (F), Vindikation (G), rivendicazione (I), vindikacija (R).
2) right in rem (A), droit réel (F), dingliches Recht (G), diritto reale (I), vjeŝtnoe pravo (R).

rompigoj. La revandikacia postulo estas nepensebla sen rompigo de la reala rajtpovo por posedi. Tie, kie ne ekzistas rompigo, tie ne povas ekzisti revandikacia postulo.

Per revandikacia postulo ne povas esti ĉesigita laûleĝa posedo[3]) aû tenado[4]). Tiel, la proprietulo, kiu per anticipa kontrakto konsentis vendi sian materian aĵon kaj, farinte anticipan kontrakton, transdonis al la estonta aĉetanto la posedon, ne povas per revandikacia postulo ekhavi la posedon, ĉar la posedo de la estonta aĉetanto estas laûleĝa. Same la proprietulo ne povas per revandikacia postulo kontraû sia luanto ekhavi la senperan posedon de la tuta materiaaĵo, ĉar la tenado, realigita de la luanto, estas laûleĝa.

Entute, la rajto de la neproprietulo por posedi, resp. tenadi, la materian aĵon ne permesas naskiĝi revandikacia postulo en favoro de la proprietulo. Ne gravas la titolo, sur la bazo de kiu la neproprietulo estas akirinta la rajton por posedi, resp. tenadi, la materian aĵon. Ne gravas ankaŭ la speco de la rajto de la neproprietulo por posedi ,resp tenadi, la aĵon. Sufiĉe estas ke ekzistu rajto de la neproprietulo por posedi, resp. tenadi, la aĵon. Ĝis kiam en favoro de la neproprietulo ekzistas tia rajto, la materia aĵo ne povas esti elprenita per revandikacia postulo.

Ne ĉiu nelaûleĝa posedo resp. tenado, naskas revandikacian postulon. Necese estas ke per la nelaûleĝa posedo, resp. tenado, estu rompita la reala rajtpovo por posedi. Tiel, ekzistas reĝimo pri la nombro de la ĉambroj, kiujn la proprietulo povas okupi en sia propra konstruaĵo. La superfluajn ĉambrojn la proprietulo ne povas okupi por sia loĝejo. En ĉambrojn la respektivaj ŝtataj organoj loĝigas la necesantojn. Se iu, sen la permeso de la respektiva ŝtata organo enloĝiĝus en tiujn ĉambrojn, lia tenado estas nelaûleĝa. Sed tiu nelaûleĝa tenado ne estas rompigo de la reala rajtpovo de la proprietulo. La proprietulo ne havas la rajtpovon okupi la superfluajn ĉambrojn. En lia rajto de proprietulo ne estas inkluzivita la rajtpovo por senpera posedo de la superfluaj ĉambroj. Sekve, post la nelaûleĝa okupo de la ĉambroj, kiuj estas superfluaj, la proprietulo ne estas perdinta ion, kion li antaû la okupo havis. Antaû la nelaûleĝa okupo la proprietulo ne havis la eblecon mem okupi la superfluajn ĉambrojn. La nelaûleĝa okupo ne estas malplibonigita lian staton, tio t. e. rompinta lian rajton.

Finfine, por ke estu naskita la revandikacia postulo, estas necese ke la nelaûleĝa posedo, resp. tenado, rompu rekte la rajton por

---

3) possession (A), possession (F), Eigenbesitz (G) possesso (I)
4) deteniton (A), déteniton (F), Fremdbesitz (G), detenzione (I)



posedi. Tiel ekzemple, ĉe neniigo de kontrakto, laû kiu la kontraktanto-proprietulo estas doninta al la kontraktanto-neproprietulo materian aĵon, naskiĝas devigo por restitucio. La kontraktanto-neproprietulo estas devigata restitui, t. e. redoni al la kontraktanto-proprietulo la materian aĵon. Se li ne redonos, sed daûros posedi, resp. tenadi la aĵon, lia posedo, resp. tenado, estas nelaûleĝaj. Tiu posedo, resp. tenado, rompos la realan rajton de la proprietulo. Sed tiu rompigo ne naskos revandikacian postulon, ĉar tiu rompigo ne estas rekta, senpera, rompigo de la reala rajto. La rompigo de la reala rajto estas rezulto de la rompigo de la alia rajto, de la obligacia[5]) rajto de la proprietulo, kiel kontraktanto. Ĉe la neniigo de la kontrakto naskiĝas en favoro de la kontraktano-proprietulo obligacia rajto por postuli restituon de la donita aĵo. La neredonado de la aĵo rompas unualoke nome tiun ĉi obligacian rajton. La rompigo de la reala rajto estas rezulto de la rompigo de la obligacia rajto. En tiu ĉi kazo ne naskiĝas por la proprietulo revandikacia postulo. La proprietulo devas serĉi sian aĵon per la obligacia postulo. Koncize, la ekzistado de obligaciaj jurrilataj, la destino de kiuj estas likvidi la nelaŭleĝan posedon, aû tenadon, ekskluzivas la naskiĝon de la revandikacia postulo.

---

5) obligation (A), obligation (F), Schuldverhältnis (G), obbligazione (I), objazatelstvo (R).